

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
135
vintro 2023-2024



leĝa depono ĉe BNF
ISSN 2609-5203

federacia retejo
<http://www.esperanto-provence.org>

prezidanto
Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkotozo (kun la gazeto): 6 €
> ĉeko al: Espéranto-Provence
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de P. Oliva)
> aŭ bankĝiro
(bankinformoj sur la aliĝilo)

sekretario kaj redaktoro
Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°**
10-a de marto 2024
bonvolu sendi al la supra retadreso
><<>
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

Vorto de la prezidanto

Mi adresas al vi miajn bondezirojn por 2024 kaj esperas, ke la nova KOVIM, kiu ŝajne revenas, estos pli malgrava ol tiu de la tri pasintaj jaroj!

La fino de la nuna jaro estis bonega danke al la sukceso de nia Kultura Semajnfino en La Garde. Mi scias, ke ĉiuj partoprenantoj ŝatis la disvolviĝon kaj enhavon de la tri kursniveletoj.

Plie, mi konstatis grandan plibonigon de la proponitaj menuoj, kompare kun tiuj de la antaŭa februara staĝo; tio estis esperita kaj grava, miaopinie!

Ĝis la plezuro revidi vin, ekz. okaze de la onta Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres...

Pierre Oliva



enhavo

2	> raportoj pri la jaro 2023	12	> nekrologo
6	> kultura semajnfino	13	> diversajtoj
8	> Eo-arbo en Correns	14	> ZEO en Nico
9	> el la provencaj asocioj	16	> agendo

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon por la jaro 2024

6 € - al Espéranto-Provence

ĉu al via loka kasisto, ĉu al nia kasisto, Nicole Lafite, ĉu per bankĝiro
(aliĝilo aldonita al ĉi tiu gazeto)

Dankon!

N'oubliez pas de payer la cotisation pour 2024

6 € - à Espéranto-Provence

*soit par l'intermédiaire de votre groupe local
soit à notre trésorière, Nicole Lafitte, soit par virement bancaire
(bulletin d'adhésion joint à ce journal)*

Merci !

**Attention : ce rappel ne concerne pas les adhérents d'Espéranto-Marseille
qui paient la cotisation inter-associative (Espéranto-France + groupe local)**

Federacia agado

Federacia membro-kunveno / Assemblée générale de la fédération

dimanĉon la 10-an de marto 2024 - je la 14-a

Les Issambres (Var) - Hotelo Miléade

kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno

Bonvolu legi la sekvajn moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2023.

La kunvokilon kaj voĉdonan rajtigilon (en okazo de via neĉeesto)
vi ricevos fine de februaro.

*Vous recevrez à la fin du mois de février la convocation et le pouvoir
(pour le cas où vous ne seriez pas présent).*

1 - Morala raporto

Pierre Oliva

La jaro 2023, pro multnombraj kazoj da KOVIM, suferis pro manko de aktivecoj, kiel dum la tri pasintaj jaroj. Bedaŭrinde, kelkaj samideanoj al kutimiĝis al tiu dormemo. La kluboj kiuj daŭrigis siajn kursojn tamen pruvis, ke Esperanto plu ekzistas kaj vivas, eĉ dum malfacilaj periodoj.

Feliĉe okazis ekz.:

- Ekspozicio de artaĵoj de Bernard Brianc̄on, dum ses monatoj en la Muzeo de Parfumoj en Mouans-Sartoux. Je tiu okazo estis kreita nova parfumo nomita «Mirlando». Por la vizitantoj, faldolioj troviĝis surloke por klarigi la viziton en tri lingvoj: france, esperante kaj angle.

- MES en les Issambres, sukcesa kiel ĉiam

- Kultura Semajnfino en La Garde en marto kaj en decembro

- Amikumu: junulo, kiu pasigis siajn feriojn en nia regiono, kontaktis nin dirante, ke li lernis Esperanton per la reto kaj kurso en Parizo. Li aldonis, ke li bezonis paroli Esperante; tri membroj de la klubo en Le Beausset renkontis lin en kafejo kaj interŝanĝis dum granda parto de posttagmezo. Tre pozitiva renkonto!

Finfine, mi esperas ankoraŭ pli da aktivecoj en 2024. Ek al laboro!

2 - Agadraporto

Pascal Vilain

1 - Membraro

Je la 31-a de decembro 2023, Espéranto-Provence havis 77 membrojn (- 14).

Kial tiu malkresko? Kutime, la sekretario sendas mesaĝojn aŭ telefonas al membroj por rememorigi, ke ili forgesis ree kotizi. Ĉi-jare, pro personaj kialoj, tio ne estis farita. Estas bedaŭrinde, ke tro da membroj ne tuj ree aliĝas komencjare, malgraŭ aliĝilo sendita kun la januara gazeto.

2 - Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2-1 deklaritaj asocioj

- **kiuj plu ekzistas kaj aktivas**

13 - Marseille - TTT-ejo **ĉi tie**

83 - Eo-Club Fréjus/Saint-Raphaël

83 - Espéranto-Le Beausset

84 - Kultura Eo-Centro de Avinjono

- **kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivas**

04 - Esperanta Kulturo en Manosque

05 - Espéranto-Gap

13 - Espéranto-La Roque

13 - Groupe Espéranto Miramas

2-2 antenaj grupoj de Eo-Provence

13 - La Ciotat

83 - Hyères

83 - Lorgues

3 - Administro

estraranoj (3)

prezidanto: Pierre Oliva

sekretario: Pascal Vilain

kasisto: Nicole Lafitte

aliaj komitatanoj (6)

Monique Arnaud, Marica Bosnjakovic, Marc Gallardo, Josiane Moirand (forpasinta en decembro), Alain Rémy (nova

komitatano elektita la 26-an de februaro, okaze de la membro-kunveno), Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

gazetrespondeculo: P. Vilain

retejrespondeculoj: T. Spanjaard, P. Vilain

reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France: T. Spanjaard

membrokunveno > februaro 26 - Les Issambres

komitatkunsido > junio 16 - Lorgues (ĉe Jean-François Cousineau)

4 - Instruado

> kursoj: en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon,

> staĝoj

- Kulturaj Semajnfinoj en La Garde (83): februaro 4-5 kaj decembro 9-10

- Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres: februaro 25 / marto 4

5 - Informado - komunikado

> disdonado de Le Monde de l'espéranto (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Hyères)

> lingvaj kafejoj

- en Marseille (La Passerelle, 26 rue des Trois Mages, 130016 Marseille), la 1-an jaŭdon de ĉiu monato

- en Hyères (Hotelo Ibis-Gare), la lastan merkredon de ĉiu monato

- en Lorgues

(Carnets de Voyage - 12 av. Allongue),

la lastan jaŭdon de ĉiu monato

> forumoj de asocioj en septembro (laŭ ricevitaj raportoj): La Ciotat (13), Marseille (13), Saint-Raphaël (83)

6 - klubaj eventoj

> januaro 10 - Marseille: reĝkuka festo

> januaro 18 - La Ciotat: reĝkuka festo

> januaro 25 - Saint-Raphaël: reĝkuka festo + membro-kunveno

> februaro 20 - La Ciotat - Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

> junio 11 - Avignon: pikniko en Barben-tane

> junio 25 - Saint-Raphaël: komuna manĝo en la Hotelo Miléade, en Les Issambres

7 - movadaj eventoj

> majo 06-09 - Liono (69): Kongreso de Espéranto-France; partoprenis 8 Proven-canoj.

> julio 3-7 - Kastelo Greziljono: 4-a Verda Naturisma Semajno, organizita de la Kulturdomo kaj INOE - partoprenis plur-aj membroj de Espéranto-Provence

> julio 29 / aŭgusto 5 - Torino (Italio): 108-a Universala Kongreso; partoprenis 20 Proven-canoj. T. Spanjaard partoprenis en la Movada Foiro kiel prezid-anto de INOE kaj Jean-François Cou-sineau reklamis pri MES.

Prelegis M. Arnaud pri «La Fontaine», R. Triolle pri «Paroli france en Francio» kaj pri «Fratoj Lumière», T. Spanjaard pri «Metromapoj, esplorenda universo».

Okaze de la 2-a Interkultura Novelo-Konkurso, P. Vilain havis la kvaran premion.

> somere - Aŭvernjo: M. kaj P. Prezioso renkontis lokajn esperantistojn.

> oktobro 15 - Parizo: kunveno de FEI - partoprenis R. Triolle kaj P. Vilain.

> novembro 23-26 - 4-a Virtuala Kongreso de UEA: partoprenis 4 Provencanoj. Konferenco de R. Triolle pri Fratoj Lumière estis spektebla. T. Spanjaard proponis filmetojn pri MES kaj INOE.

> dum la tuta jaro: J. Cousineau korektis la revuon «Espéranto-Info»; P. Vilain korektis «Le Monde de l'espéranto».

8 - kulturaj kaj alispecaj eventoj

> aprilo 15 / novembro 11 - Mouans-Sartoux (06): Bernard Briançon proponis sian ekspozicion «Alice au Pays des Merveilles», akompanatan de kreado de parfumo: «Mirlando».

> aprilo 24-30 - Kastelo Greziljono: partopreno de Bernard Bigonnet en korusa staĝo Interkant

> majo 31 - La Ciotat: prelego de R. Triolle pri la franca versio de la verko «La danĝera lingvo».

> junio 25 - Gap Monique Arnaud partoprenis en la Pacmovado-Festo.

> junio - Fejsbuka «Mojosa Mondo» - Paulette Chiarisoli partoprenis en verk konkurso: «La plej memorinda afero en mia infanaĝo».

> aŭgusto 28 / septembro 1 - Bouresse - Kvinpetalo: staĝo pri malkovro de as-

tronomio, gvidita de P. Lagrange.

> septembro - La Ciotat: Salono de verkistoj - Patrick Chevalier prezentis romanon sian kaj Renée Triolle lerno-librojn en Esperanto kaj francajn librojn en kies traduko al la franca ŝi kontribuis.

> septembro 7/10 - Centre Hélio-Marin Montalivet: partopreno de Thierry Spanjaard, kiel prezidanto de INOE, en la 70-a datreveno de la Internacia Naturista Federacio.

> oktobro 21 - Correns: Inaŭguro de Esperanto-arbo

> novembro 3-5 - Beogrado (Serbio): Internacia naturista naĝkonkurso.

Partoprenis pluraj INOE-Provencanoj.

> decembro 2 - La Ciotat: librosalono. Partoprenis R. Triolle kun lernolibroj siaj kaj libroj tradukitaj en E-on.

9 - diversajtoj

> T. Spanjaard en Marsejlo akceptis en la somero polojn kaj tenerifanon; same faris M. Duc Goninaz en Aix-en-Provence kun brazilanoj.

> forpaso de federacioj: Chantal Beaumont 26/02; Denise Loisel 6/04; Roger Siarri 26/04; Mari-Roza Vilain 31/05; Myriam Bourgeois 7/09; Jean-Pierre Schneider 20/09; Josiane Moirand 5/12; Charles Carrey 25/12.

> julio ĝis septembro: A. Rémy biciklis tra Eŭropo kaj renkontis esperantistojn.

10 - venontaj okazaĵoj

> marto 9/16 - Les Issambres: Mediteranea Esperanto-Semajno 2024

3 - Financa raporto

Nicole Lafitte

bilan financier 2023			
recettes		dépenses	
cotisations	114,00	3 décès	287,00
dons	77,00	journal Eo-Provence	211,00
intérêts sur 1 part sociale	1,00	assurance	261,00
2 stages à La Garde	6 197,00	2 stages à La Garde	5 114,00
livret	3 500,00	livret	3 500,00
vente de livres	7,50	M. Arnaud (Génépi)	21,00
		timbres et L.R. Préfecture pour mise en place MES	57,00
		frais banque Eo-Provence et création MES	70,00
		excédent	375,50
total des recettes	9 896,50	total des dépenses	9 896,50
solde au 31/12/2023 > compte courant : 3 175,50 €; livret épargne : 4 668,32 €			
la trésorière : Nicole Lafitte ; le président : Pierre Oliva			



24 samideanoj, el kiuj tri kursgvidantoj, kuniĝis en Domaine de Massacan, en La Garde (83) por Kultura Semajnfino organizita de la Federacio Esperanto-Provence.

"Kia bela Esperanta kultura semajnfino! Elstaraj instruistoj, belega loko ĉe la marbordo, entuziasmaj partoprenantoj.... Pri kio pli bele eblas revii?"

Thierry Spanjaard



1-a nivelo kun Andrea Bertrand

Ni estis kvin staĝantoj, kiuj preferis aliĝi al la konversacia grupo de Renée dum ĉi tiu staĝo en La Garde. La unua temo kiu estis pritraktita koncernis nunajn armitajn konfliktojn.

Mondpaco ne baldaŭ venos, bedaŭrinde. Estas tia malamikeco inter najbaraj popoloj, ke la perspektivoj de daŭra paco estas tre malproksimaj.

Ni povis ankaŭ diskuti temojn pri homaj rajtoj, la protekto de naturo kaj ĝiaj implicoj por la homoj, kiuj vivis dum generacioj en nuntempe protektitaj lokoj (ekz. indiĝenoj en Afriko estas forpuŝitaj de sia loĝloko por lasi lokon al bestoj...).

Ni estis grupo de kvin komencantoj kaj ni laboris kun Andrea.

Ni faris diversajn ekzercojn sole aŭ en grupo por plibonigi niajn prononcon, konversacion kaj komprenon.

La instruistino klarigis al ni kelkajn gravajn gramatikajn punktojn.

Andrea helpis ĉiujn progresi.

Dankon al ŝi !

raportis Anne Bernier

Ni povis ankaŭ sekvi la aventurojn de fraŭlino, kiu povis gajni grandan sumon en la loterio (ĉina novelo). En ĉi tiu situacio, neatenditaj eventoj foje okazas. Sed neniu el ni spertis tion. Eble iam.

raportis Marc Gallardo



2-a nivelo kun Renée Triolle

10 décembre 2023. Dernier jour du stage espéranto : très intéressant dans mon groupe où nous avons parlé de l'histoire et de la culture espérantistes et éclairci des points de grammaire pas évidents.

raportis Alain Rémy



3-a nivelo kun Pascal Vilain

Esperanto-arbo en Correns

Pascal Vilain

Sabaton la 21-an de oktobro 2023, venintaj el la tuta Sudfranca Provenco laŭ invito de la vilaĝo **Correns**, trideko da geesperantistoj kunvenis por inaŭguro de «**Esperanto-arbo**», vilaĝa tilio. Ĉar Esperanto-familio, Paulette kaj Gérard Chiarisoli, tie loĝas...

ĉar la vilaĝaj estrino kaj konsilantaro jesis pri partopreno en la projekto iniciatita de Unuiĝintaj Nacioj kaj alprenita ankaŭ de UEA per kampanjo «Tutmonda Arbo-plantado: 1000 arboj ĝis 2030»...

ĉar entuziasmiĝis pri la ideo la federacio Espéranto-Provence...

nur restis inviti la regionajn Esperanto-asociojn por tiu inaŭguro kaj la regalo kiu sekvis, ofertita de la vilaĝa magistrato.

Post komuna manĝado, ĉiuj partoprenantoj disiĝis dezirante longan vivon al la Esperanto-arbo de Correns.



Esperantistoj kaj vilaĝanoj de Correns, inter kiuj la vilaĝestrino, ĉirkaŭ la tilio.



Promenante en Correns, ĉarma Var-a vilaĝeto, ne forgesu viziti la Esperanto-arbon, facile rekoneblan danke al sia verda ŝildo

Kial planti arbon kaj doni al ĝi tiun nomon, «Esperanto-arbo»?

Plantado de arboj, unu el la plej esencaj agadoj por kompensi karbon-dioksidon, troviĝas inter la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, deciditaj de Unuiĝintaj Nacioj kaj realigeblaj en la jardeko 2020/2030.

UEA plene aprobis tiun celon kaj lanĉis sian propran kampanjon pri arbo-plantado.

Ĝi malfermiĝis la 20-an de septembro 2020 kaj finiĝos la 24-an de oktobro 2030, t.e. je la datreveno de Unuiĝintaj Nacioj, kiam estos analizitaj kaj redefinitaj la Celoj de Daŭripova Evoluigo.

Kiel diris en 2020 la vicprezidanto de UEA, Fernando Maia:

«Ĝermu nun nova epoko – meze de la defioj de la pandemio, ni rezistu, ni venku, ni supere floru kiel movado, kiel socio, kiel homaro. La arboj estos por tio portantoj de nia simbolo de rezisto kaj espero».

Post sendo al la responsuloj de la UEA-kampanjo de raporto pri la evento en Correns, nia federacio ricevis la jenan mesaĝon:

Ni dankas por la raporto kaj gratulas por la atingo. La ŝildo bele prezentas ke temas pri E-arbo. Mi aldonas vian arbon al la listo.

*Bondezirojn sendas Normando Fleury,
kunrespondeculo pri la kampanjo - Arbo-plantado de UN - UEA*

El la provencaj asocioj

Renée Triolle



13 - Espéranto - La Ciotat

Librosalono la 2-an de decembro

En la korto de la plej malnova kino-teatro de la mondo, Edenteatro en La Ciotat, okazis librosalono kun ses verkistoj (mi prezentis lernolibrojn aŭ librojn, kiujn mi tradukis de la franca en Esperanton aŭ de Esperanto en la francan).

Mia budo apudis tiun de Frédéric Ganga, la urba heroldo, poeto kaj simpatianto de la internacia lingvo. Okazo ne riĉiĝi pro vendo de libroj, sed informi pri Esperanto, aŭ okazo trovi ekz. filinon de esperantistino, kiu korespondis kun finna samideano antaŭ la Dua Monmilito.



13 - Espéranto - Marseille



Ni malofte omaĝas la lernantojn, tamen ĉi-jare en Marseille, bona grupo ĝoje lernas kaj praktikas.

Kvizo en Marsejlo

Sabate la 25-an de novembro okazis kvizo en la Inĝeniera Altlernejo "Centrale" en Marsejlo.

Espéranto-Marseille estis invitita kun kvar aliaj asocioj (SOS-Méditerranée, asocioj pri klimato, seksa egaleco, civitaneco). Marc Gallardo konceptis la demandojn por la kvizo (pri la lingvoj en la mondo, pri la verkinto de Esperanto kaj kelkaj gramatikaj reguloj).

Mi preparis materialon, pensante, ke ĉe-estos studentoj, estontaj inĝenieroj, portis librojn, afiŝojn... kaj evidentiĝis, ke temas pri 15-minuta interveno antaŭ lernejoj de mezgradaj lernejoj en la nordaj kvartaloj de Marsejlo.

Vizitis nin ses klasoj. Fakte la studentoj de Centrale investiĝas dum la lerneja jaro por helpi tiujn infanojn el malaltaj socitavoloj fari la hejmajn taskojn kaj malfermiĝi al kulturo. Kaj la kvizo, sekvita de kuka bufedo, estas ludo por ke ili atente aŭskultu, notu,

memoru pri temoj rilataj al la ĝeneralaj temoj.

Mi devis improvizi la intervenon, komencis per du frazoj en Esperanto (ĉu estas itala, portugala, hispana lingvo?), temas pri la "langue équitable" (kion signifas "équitable"?).

Sekvis panoramo de la lingvoj en la mondo (prepare al la kvizo), prezento de la verboj (aktiva, kun helpo de Rosy Inaudi), de derivado, kun koloraj "lego"-j.

Ŝajne la lernantoj estis intersitaj, iuj tre bone respondis, reagis, faris demandojn (eĉ: kie eblas aĉeti libron?).

Sed pli interesa estas la kontakto kun la Asocio de studentoj kaj posta ebleco interveni plilonge (du horojn) en la koncernaj klasoj iam dum la lerneja jaro.

Dankante pro la organizo, mi donacis mian libron "Espéranto Express" al la studentino, kiu zorgis pri nia ateljero.



83 - Regulaj ĉiumonataj Esperanto-renkontiĝoj en Hyères (live) kaj Lorgues (dekstre)





Dimanĉon la 17-an de decembro, la Zamenhoftago kunigis kiel ĉiujare membrojn de la loka Eo-klubo kaj geamikojn venintajn el aliaj PACA-urboj.



Sub la stratplato «Dr. Zamenhof», ĉirkaŭ la nova klubprezidantino Carmen Segarra, la ĉeestantoj omaĝis al Denise Loisel, kiu longtempe zorgis pri la asocio, unue kun sia edzo André, kaj sole post lia forpaso.

Post kelkaj vortoj pri la signifo kaj trafeco tiel kuniĝi apud la nomo de la iniciatinto de nia lingvo, kiu ĉiam volis esti nur «unu el...», certe ne «majstro»... Pascal Vilain finis sian paroladon per la jenaj vortoj:



«Ĉar ni kuniĝis ĉi tie por honori la memoron al D-ro Zamenhof, mi ŝatus aldoni, ke ne nur genia iniciatinto de nia lingvo li estis, sed ankaŭ noblasenca viziulo, kiu ekzemple konsideris nerealisma la ideon krei judan ŝtaton sur la Palestinaj teroj, eĉ proponante ke tia ŝtato estu kreita ie sur la Amerika kontinento. En sia projekto «**Hilelismo**», aperinta ruslingve en 1901, Zamenhof iel profetis: «**La judoj en Palestino estos eterne kiel sur vulkano.**» La daŭra kaj ĵus paroksismigita konflikto inter la Gazaa Ĥamaso kaj Israelo bedaŭrinde pravigas la pesimistan antaŭvidon de la unua el ni ĉiuj, kies nomo prave montriĝas sur multaj stratŝildoj, sed kiu neniam ricevis Nobelpremion pri Paco, kvankam li tiun ege meritus.»



Nekrologo



La 5-an de decembro forpasis en Aix-en-Provence **Josiane Moirand**, 80-jara, membro de nia federacio Espéranto-Provence.

Ŝi estis la vidvino de Daniel, forpasinta en 2019.

Ĝus antaŭ ol sendi la gazeton por printado, mi eksciis pri la forpaso en Hyères, la 25-an de decembro, de **Charles Carrey**. Mi reparolos pri li en la printempa numero. (*ndlr*)

Espéranto-Provence sincere funebras kaj kondolencas la familianojn de Josiane kaj Charles.

Omaĝe al Josiane

Marie-Thérèse Lloancy

Kiam unuafoje mi renkontiĝis, en Grezijono, kun la nedisigebla triopo Josiane - Daniel - Sylviane? Mi ne povas precize diri; sed kion mi scias, estas la plurjara kunĝuado de someraj restadoj kun Daniel kiel staĝestro, kaj la du fratinoj tiom diskrete kiom efike prizorgantaj la ĝeneralan mastrumadon, i.a. la organizon de ĉiam bon-gustegaj manĝoj... el kiuj elstare memorindas ilia ĉefverka kuskuso! Ĉio en bonhumoriga etoso, ekvilibre inter la humuro de Daniel, la ĝoje ŝercema vikleco de Sylviane, kaj la zeneca, ankaŭ humurema mildeco de Josiane, kun tiel forta ligo inter ambaŭ pli aĝa kaj pli juna fratinoj.

Mi volas ĉi tie insisti, ke tiu sindoneme efika triopo forte kontribuis, inter julio 1998 kaj aŭgusto 2000, al re- kaj plu-funkciigo de la Kulturdomo

spite la gravan krizon de 98. Ekzemple, kiam en julio 99 ni relanĉis someran programon invitante la faman lingvistinon Henriette Walter, deĵoris la triopo, kaj bonegan tagmanĝon por la tuta partoprenantaro aranĝis la du fratinoj.

Tiuj tri estis el tiuj esperantistoj, kiuj amegis Grezijonon, kiu tiom ŝuldas al ili; mi memoras, ke post iu staĝo, kiun ili prizorgis, Daniel kaj Josiane preparad-ad-is la reveturon al Aix, kaj tio daŭradis... tiom longe, ke Josiane konfesis al mi: "Ni ne sukcesas foriri"...

Post Daniel kaj Sylviane, nun ankaŭ Josiane nin forlasis, sed ilia memoro nepre plu ŝvebu super Grezijono.

Kaj niaj plej sincere kondolencaj pensoj iru al Nicolas kaj Isabelle, memore pri la belaj travivaĵoj kun aliaj "infanoj de Grezijono".

Forpasis la fama franca esperantistino Josiane Moirand, kiu dum pluraj jaroj aktivadis en Esperanto-movado kun siaj edzo Daniel Moirand (forpasinta en 2019) kaj fratino Sylviane Guibert (forpasinta en 2022). Ili loĝis kaj esperantumis ĉefe en Aix-en-Provence.

Dum pluraj jaroj Josiane, Daniel kaj Sylviane mastrumadis en la Esperanto Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj „Kastelo Grésillon”, prizorgante laborojn en la oficejo, kuirejo, butikoj, zorgante pri ordo kaj pureco de la domo kaj pri la kultura programo. Ĉiam ridetanta, modesta, helpema, amika persono - jen Josiane...

Sur la foto farita de mi en la butikoj de Grésillon somere 2001, aperas Josiane, Marie-Thérèse Lloancy (Mitou) kaj Sylviane (maldekstre videbla ankaŭ la kapo de Dominique Baron).



><><><><<

Josiane Moirand ŝategis kanti kaj ĉiam plezure partoprenadis komunajn kantadojn, riĉigante ilin per sia belega voĉo. Jen ŝi en la korusetoj kun Lydia Buyst, Sol Roca kaj Martine Demouy kantante la infanan kanzoneton „Pomo” kun teksto de Valerij Vorobjov kaj melodio de Liven Dek dum la Mediteranea Esperanto-Semajno en 2016: <https://www.youtube.com/watch?v=x6zhNyo2I8k>

Diversaĵoj



La 51-a Internacia naĝkonkurso

«Swimming Gala 2023» okazis en Beogrado de la 3-a ĝis la 5-a de novembro 2023.

Ĉirkaŭ 100 naĝantoj de 14 teamoj partoprenis en ĝi.

Plianstrojn konkursojn teamo de INOE, Internacia Naturista Organizo Esperantista, kun i.a. ties prezidanto Thierry Spanjaard.

Mil-abona EsKu

La 5-an de decembro 2023, Marica Bosnjaković telefonis al mi por sciigi, ke ŝi ne partoprenos en la kultura semajnfino en La Garde kaj sekve ne povos ĉeesti la komitatkunsidon de Esperanto-Provence, kiu sekvos la staĝon.

Ni plu parolis pri aliaj temoj, ekz. pri la verko «La Danĝera Lingvo» kaj pri la EsKu-filmeto, kiu tion jam pritraktis. Tiam mi sciigis al ŝi, ke nia Jutuba kanalo EsKu havas hodiaŭ 999 abonantojn. «Ho, sed mi ankoraŭ ne abonis la kanalon! Kiel mi povas tion efektivigi?» tuj diris Marica. Mi tion klarigis al ŝi kaj ŝi promesis, ke ŝi tuj faros.

Kelkajn minutojn poste, la Jutuba paĝo de EsKu indikis: 1 k da abonantoj.



Mi do povas oficiale anonci al Marica, ke ŝi iĝis nia mila abonanto!

Dankegon al ŝi, nome de la EsKu-teamo... t.e. Thierry Spanjaard kaj mi.

Kaj vi, kara leganto, ĉu vi jam estas fidela spektanto kaj abonanto de nia kanalo?

Se ne, kial plu prokrasti vian abonon?

La Jutuba Esku videblas ĉi tie:


<https://www.youtube.com/@EsKuEsperantoKulturo>

Voyage en Utopies

Du 20 au 24 septembre a eu lieu à Marseille la 4e édition du festival de sciences sociales «Allez Savoir» avec pour thème "**Voyage en Utopies**".

Le 23 septembre, une table-ronde a réuni à l'Auditorium de la Bibliothèque de l'Alcazar les intervenants suivants : Régis Fournier (Espéranto-France), Pascal Dubourg Glatigny (Histoire de l'art) et Jade Nguyen (Littérature), qui ont traité le thème : **«Sur les traces d'un espérantiste anticolonialiste : le Vietnam à vélo»**.

« Lucien Péraire est un ouvrier espérantiste qui entreprit en 1928 un voyage à vélo jusqu'en Indonésie.



Motivé par son désir de comprendre «les causes des guerres», il éprouva également la possibilité d'une communauté transnationale et solidaire à travers le réseau mondial des espérantistes. Il laissa un important fonds documentaire, composé de plusieurs récits en sténographie, français et espéranto, dont une partie consacrée au Vietnam. »

Le 24 septembre, dans le Centre de la Vieille Charité, Gilles Perez et Pascal Dubourg Glatigny ont proposé un atelier pour « **Apprendre l'espéranto avec Lucien Péraire** » .

« L'atelier propose d'apprendre les bases de la langue en suivant les traces de de Lucien Péraire, un ouvrier espérantiste qui a traversé l'Europe et l'Asie à vélo au début du 20^e siècle. Lucien aussi avait donné des cours d'espéranto à Canton en 1931. »

ZEO-j en Regiono «SUD / PACA» > 13 – Nice (06)

Post ZEO en Marsejlo, prezentita en la n° 127 (vintro 2021-2022), jen ZEO en Nico... aŭ fakte iama ZEO, ĉar laŭ mesaĝo ricevita de **Jean-Pierre Cavelan**, Nicano, ĝi ne plu ekzistas.

Jen la respondo de Jean-Pierre al mia peto pri nica «**Skvaro Zamenhof**».

Dankon, Yanpetro!

«Skvaro Zamenhof en Nice ekzistis. Mi memoras pri la ŝildo. Estis Robert Llorens, kiu obtenis la nomon dum la jaroj 1980-aj. Fakte la urbeŝtaro de Nice neniam multe zorgis, nek pri Esperanto, nek pri Nice-Espéranto. Sed ĉar Roberto estis tre agema esperantista aktivulo, li sukcesis obteni ĉi tiun ŝildon. Fakte ĉi tiu skvaro estis nur "teoria", ĉar reale ĝi estis nur kruciĝo de stratetoj. Tio estas, ke neniu loĝis ĉe "Square Zamenhof". En la praktika vivo, neniu taksisto bezonis koni adreŝon je "Square Zamenhof".

Laŭ mia memoro, ĝi lokiĝis je la kruciĝo de la stratoj Caffarelli kaj chemin Saint-Philippe.

Sed de tiam la kvartalo multe ŝanĝiĝis, kaj dum ĉi tiuj ŝanĝoj la "Square Zamenhof" tute malaperis.

Oni povas kontroli tion per Google Maps. Ĉi-sube sur malnova mapo de la kvartalo oni povas legi "Square Dr Zamenhof"-n, sed la mapo datumas de pli ol 35 jaroj.»



*Ĉu vi vidis la nomon de la skvaro sur la mapo? (eble ne bone legebla)
> Sq. Dr Zamenoff!*



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

Plusieurs cafés linguistiques "espéranto" :

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6ème

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)

bar de l'hôtel Ibis-Gare - 45 rue Edith Cavell (face à la gare)

infos : *Pascal Vilain - 06 42 19 68 51*

dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

mars 9 - 16 - Les Issambres (83)

MES - Semaine méditerranéenne d'espéranto

mars 10 - 14 h - même lieu : Assemblée Générale de la Fédération Eo-Provence

en France

pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

février 17-24 - La Bastide-sur-l'Hers (09) : 31e Kanto-Semajno du Tut-Pirenea Esperanto-Koruso. Semaine de chant choral, sous la houlette d'Elisabeth de Mestral.

<https://eventaservo.org/e/9cc092>

mai 8-12 - Strasbourg : Congrès européen d'espéranto, organisé par Espéranto-France et Espéranto-Strasbourg

<https://esperanto-france.org/congres-europeen-2024?lang=fr>

ailleurs dans le monde

juillet 20-27 - Maceió (Brésil) : 57e Congrès International de l'Éducation - Eo ILEI.

https://2024.kongreso.org/ILEI_chefa.php

août 3-10 - Arusha (Tanzanie) : 109e Congrès mondial d'espéranto

La 1ère lettre d'information est déjà disponible :

<https://uk.esperanto.net/2024/unuabulteno>